# *Koreografia diverseco regas en la 28-a Internacia Havana Balet-Festivalo Alicia Alonso*

*Image not found or type unknown*

**Foto: PL**

Havano, okt 29 (RHK) Verkoj de koreografoj el Britio, Kanado, Rusio, Meksiko, Francio, Brazilo kaj Kubo estas ekspoziciitaj hodia? en ?i tiu ?efurbo danke al la 28-a Havana Internacia Baleto-Festivalo Alicia Alonso.

Artistoj el pli ol 15 landoj dividas la scenejon en Kubo por ?i tiu evento, kiu estas celebrata de la 28-a de oktobro ?is la 10-a de novembro.

La publiko povos ?ui ri?an propgramaron inter ili, Diamantoj, unu el la pas de deux de la verko Juveloj, de la ruso George Balanchine, prezentita de Liudmila Konovalova, el la Viena ?tata Baleto, kaj la a?stra artisto Rainer Krenstetter.

Por fermi la Vesperan Programon, la dancensemblo Danza Contemporánea de Cuba prezentos fragmenton de Mambo 3XXI, de Georges Céspedes, kun muziko de Nacional Electrónica kaj Beny Moré.

La Anajnu Veatem-Juda Danckompanio en Meksiko, kun pli ol 50-jara historio, proponos prezenton en la salono Covarrubias, de la Nacia Teatro.

Fonto: PL

---

https://www.radiohc.cu/eo/noticias/cultura/368513-koreografia-diverseco-regas-en-la-28-a-internacia-havana-balet-festivalo-alicia-alonso

**Radio Habana Cuba**